

Universala Esperanto-Asocio

**LABOR-PLANO**

Estrara Subteamo: MOVADO

Estrara Komuniko EKO 2015-50 sendita el Budapeŝto la 25an de novembro.

## Laborplano por tiri maksimumon el la lastaj monatoj

La estraro eniris la lastan jaron de sia mandato. Restas apenaŭ sep monatoj por solvi pendantajn problemojn kaj plenumi kiom eble la projektojn el la Strategia Plano de la Asocio. Por fari la necesan prioritatigon de laboroj, konforme al niaj modestaj laborfortoj kaj rimedoj, la estraro kreis novan, koncizan planon por sia lasta jaro, de julio 2015 ĝis julio 2016. Komitatanoj ricevis ĉi tiun planon antaŭ ĉ. monato; nun okaze de nia 'jubilea' kvindeka EKO-komuniko, ni dissendas ĝin pli vaste.

La dokumento dediĉas po du liniojn al la kvar ĉefaj agadkampoj (konsciigo, kapabligo, komunumo, kunordigo), por ĉiu ĝi fiksas agad-fokusojn. Sekvas listigo de ok prioritataj taskoj (neniu kun pli ol trilinia priskribo). La cetero de la plano difinas la ĉefajn taskojn ene de tiuj prioritatoj, kune kun simpla temposkema tabelo por ĉiu prioritato, kiu indikas la laborojn laŭ tri tempoperiodoj: aŭgusto-decembro, januaro ĝis marto 2016 kaj aprilo ĝis julio. La tuta teksto okupas nur kvar paĝojn, do kuraĝu legi ĝin! Ni aldonas alkroĉe la ilustritan version de la plano, kiu same estas videbla ĉe http://www.uea.org/teko/agado. Laŭpete, eblas ricevi la senbildan version en formato Word. La dokumento formos bazon por nova planpropono por la periodo 2017-2020, kiun la nuna estraro heredigos al la nova, elektota en Nitra.

## Avantaĝa aliĝo al la 101a Universala Kongreso en Nitra

Ni memorigas vin, ke la unua aliĝperiodo por Nitra finiĝos en la 31a de decembro 2015. Restas kvin semajnoj por fari vian decidon. Multlande, eblos aliĝi dum festoj de la Zamenhofa tago. Kaptu la okazon!

Se vi ne estas nuntempe membro de UEA, ni konsilas membriĝon same antaŭ la jarfino en minimume la kategorio MJ; via kongresaliĝa ŝparo plios ol la membriĝa kosto. La loĝkostoj en Nitra estos moderaj, laŭ la normoj de multaj landoj kaj la sperto tra la lastaj UKoj. La kongreso ja okazos en universitata konstruaĵaro, do multaj restadebloj troviĝas en apudaj studentaj hejmoj, aldone al hoteloj de ĉiu kategorio.

## Nova numero de "Babilanto" – voĉo el Togolando

Tion eldonas APETO (Agado por la Progesigo de Estperanto en Togolando). Klare, temas ne nur pri togolandaj raportoj. Numeroj senpage rigardeblaj ĉe: www.esperanto-en-togolando.jimdo.com. Post rigardo, vi povos subteni la eldonadon kaj la agadon per donaco al la Afrika Fondaĵo de UEA!

En tiu 13a numero, oni povos legi pri:

P.1 – Malfermaj vortoj de la redaktoro, Aĝevi Aĝe; Tago de Esperanta libro (libro 'El Togolanda saĝosako')

P.2 – Ne nur la Z-Tago (alvoko Stefano Keller); Afriko dum kongreso en Japanio (raportas Lee Jungkee); Babilmanĝo en la rapidserva restoracio "Sweet-Land"

P.3 – Esperanto plie eniras togolandajn lernejojn; Movoj en Suda Kivu, DR Kongo; Nova E-Klubo en Benino

P.4 – Ĉu nova elano en Kenjo?; Kelkaj ideoj por konstrui kluban vivon

P.5– Afrika Kongreso 2016; Kiel atingi Rumonge, Burundo; Eĥoj el Sudafriko; Deziras korespondi; Ni subtenas Afrikan Kongreson 2016

P.6 – Praktikaj sciigoj pri la Afrika Kongreso de Esperanto (AKE) 2016

## 6a Kongreso de Kuba Esperanto-Asocio: kun renoviĝanta elano

De la 18a ĝis la 22a de novembro Kuba Esperanto-Asocio kongresis en Havano, en la sidejo de la Nacia Unuiĝo de Arkitektoj kaj Konstruinĝenieroj kun la ĉeesto de la nacia televido kiu raportis pri ĝi en la taga novaĵservo. La kongreson partoprenis 134 geesperantistoj el 10 landoj; pli ol dudek eksterlandanoj, el Kanado, Usono, Germanio, Belgio, Brazilo, Islando, Nederlando, Hispanio kaj Rusio, kiuj kun la kuba esperantistaro debatis la temon “Lingvo kaj Kulturoj: identeco en diverseco”.

La temo ampleksis la lingvan diversecon en Ameriko, la lingvan rolon en la formado de la identeco kaj la gravecon protekti la kulturan kaj lingvan diversecon; oni laboris en grupoj kiuj raportis al la pleno. Prelegis d-rino Sabine Fiedler (Germanio) pri la Esperanta frazeologio; d-ro Duncan Charters (Usono) pri Instruado de Esperanto kaj Teknologio kaj d-ro Orlando Raola (Usono) pri identeco kaj kultura diverseco en la verkaro de José Martí (la Nacia Heroo de Kubo).



Okazis laborkunsidoj de la kuba ILEI-sekcio kaj la junularo, paroligaj kursoj kaj libro-prezentado. Vesperoj estis plenaj je muziko, kubaj kantoj kaj dancoj, deklamado kaj koruso.

Sur la foto: Geomar Martínez kaj Jany Quiñones, kiuj kantis tradiciajn kubajn kantojn.

Antaŭkongrese okazis Lingvistika Simpozio pri Esperanto en la Havana Universitato, sub aŭspicio de la Kuba Instituto pri Literaturo kaj Lingvistiko kaj KEA, kiun partoprenis kubaj lingvistoj, tradukistoj kaj lingvoinstruistoj el la kubaj universitatoj kaj lingvaj institucioj. Sekve, la 18-an kaj 19-an, okazis la Seminario pri Aktivula Maturigo, AMO 16, pri la temo “Konsciigo, kapabliko, komunumo; paŝoj al plia profesiiĝo”. Tion partoprenis 25 kubanoj plus eksterlandaj observantoj el Usono kaj Kanado. Pli detala raporto pri tio sekvos.

La kubaj esperantistoj dankas al ĉiuj geamikoj el la tuta mondo pro la afabla kaj elkora kundivido de amikeco kaj interproksimiĝo!

Mallongigita el teksto de Maritza Gutiérrez González, Havano, 23-11-2015.

Vortoj: 780

Al: Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, ILEI-aktivuloj, TEJO-estraro, la E-gazetaro kaj radiostacioj, listoj kaj unuopuloj (petu senpagan ricevon!).

Por vidi pli malnovajn komunikojn iru al: www.uea.org/vikio/Komunikado_kun_LA,_FA...

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.